

BRAZILA ESPERANTISTO

78-a Jaro

Oktobro-Decembro 1984

N-ro 283



Campinas: sur Placo Carmo Monumento al Carlos Gomes

Oktobro-Deembro 1984

78-a Jaro

N-ro 283

Brazila Esperantisto
("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo,
societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto n-ro 4.356, 26/10/1921

Respondeca Direktoro: Fernando Marinho
Redaktoroj: Luiz A. B. Martins kaj Joel Manso

Administracio kaj Redakcio
Praça da República, 54 - 2º
20211 - Rio de Janeiro, RJ, Brazilo

Senpaga por anoj de B.E.L.
Eksterlande: 20 respondkuponoj

SERVIÇO DE LIVROS

Em virtude da constante variação cambial, a Liga Brasileira de Esperanto é obrigada a fixar o preço do livro estrangeiro em cupom-resposta internacional (internacia respondkuponono).

O valor do cupom-resposta é fornecido pelas Agências do Correio.

● *Trojlo kaj Kresida*, W. Shakespeare. El la angla originalo tutproze tradukita de Stephen A. Andrew. The Esperanto Publishing Co. Ltd., 1952. 3

● *Vivo de Pissaro*. Originale verkita en Esperanto de Lodovic-Rodo. Portugalu Eldona Rondo. 1948. 0,5

● *Ventoj*, Blagoja Ivanov. El la makedona tradukis Josip Velebit. Internacia Kultura Servo. 6

● *Sklavoj de Dio*, Géza Gardonyi. El la hungara lingvo tradukis Johano Hamvai. Hungara Esperanto-Asocio. 410 p. 9

● *La Revizoro*, N. V. Gogol. Trad. L.L. Zamenhof. Represo de la 2-a eldono. Japano Esperanta Librokooperativo. 15,5

Liga Brasileira de Esperanto

Quota anual de adesão

1985

M S categoria destinada aos que não são esperantistas mas simpatizam com o movimento; o sócio tem direito a utilizar a Biblioteca e o serviço de livros, participar das atividades sociais e receber os boletins editados pela Liga. Inscrição:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 7.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 15.000

M 1 categoria destinada àqueles que já estão integrados no movimento esperantista; recebe o mesmo que o M S. Inscrição:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 21.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 45.000

M 2 tem os mesmos direitos que o M 1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento. Inscrição:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 63.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 135.000

D M categoria destinada àqueles que desejam integrar o quadro social da Liga na qualidade de Membro Vitalício. Paga a importância correspondente a 30 vezes o valor da quota M 1. Tem os mesmos direitos que o M 2. Pagamento:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 630.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 1.350.000

Todas as importâncias devem ser remetidas, em cheque pagável no Rio de Janeiro, ou vale postal, em nome da Liga Brasileira de Esperanto: Praça da República, 54 2º andar, 20.211 - Rio de Janeiro, RJ.

Curso por Correspondência

A Liga Brasileira de Esperanto mantém os seguintes cursos por correspondência: básico, de aperfeiçoamento, superior e magistral.

Taxa de inscrição:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 28.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 60.000

A taxa de inscrição é a mesma para todos os cursos.

Os cursos são privativos dos sócios da Liga.

A inscrição para os cursos por correspondência poderá ser feita em qualquer época do ano.

Survoje al reintegrigo



La okazigo de la 20-a Brazilia Kongreso de Esperanto estis defio por la Organiza Komitato, kiu frontis ĝin kun plena sukceso: a) la 20-a estis la unua kongreso de Brazilia Esperanto-Ligo de post 19 jaroj; b) ĝi okazis sub la aŭspicioj de la tri landaj asocioj Brazilia Esperanto-Ligo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Brazilia konsilantaro de Esperanto; c) en la daŭro de tiuj 19 jaroj la Brazilia Esperanto-Movado perdis sian unuecon (la kongresa temo atestas tion).

Kun 446 aliĝintoj la 20-a Kongreso okazis de la 12-a ĝis la 15-a de Julio 1984, en Campinas (SP), kaj ĝi certe fariĝos inspiro por la venontaj kongresoj sub la aŭspicioj de la tri landaj asocioj. La organizo mem de la Kongreso, la varia programo, la harmonia atmosfero de la kongresanoj kvazaŭ spertantaj eventon cele al la reintegrigo, la gastama urbo, ĉio kontribuis al la sukceso de la Kongreso, kiun rikoltis Esperanto-Asocio de São Paulo, kiu prenis sur sin la malfacilan taskon organizi ĝin.

Kiel konsekvenco de la laboro de la organizintoj, ni mencias la atenton, kiun donis la lokaj gazetararo, radio kaj televido. Ni povus elnombri plurajn bonajn programerojn, sed ni citu nur jenajn: la malferma kunsido, la alta nivelo de la prelegoj, la Monumento al Zamenhof, la libroservo organizita de la Es-

perantista Junularo, la aŭkcioj, la baza kurso en 5 horoj kaj la konversacia rondo.

Aparte menciinda estas la urbo de la Kongreso. Hodiaŭ Campinas estas unu el la plej disvolviĝantaj urboj en Brazilo. Situacianta 90 km proksime de la ĉefurbo de la Ŝtato, ĝi estas granda indusiria, komerca kaj kultura centro kaj metas sub la disponon de la turistoj varian allogaĵon, kiaj muzeoj, artgalerioj, kinejoj, teatroj, publikaj parkoj kaj arbaretoj, restoracioj, stadionoj, hoteloj, k.a.

Malfena Kunsido

La amplekso de la Ruĝa Salono, kiu dum la Kongreso ricevis la nomon Salono Zamenhof, apenaŭ akceptis la kongresanojn, en la 12-a de Julio. Sur la muro antaŭ la publiko pendis la portretoj de Prezidanto João B. de Figueiredo kaj L.L. Zamenhof. Sur la podio, malantaŭ la tablo, staris la flagoj de Brazilo, de Ŝtato São Paulo kaj de Esperanto. Ĉe la tablo sidis la Ŝtata Deputito Osiro Silveira, prezidanto de la Kongreso, D-ro Ozayr Rizzo, de la Komunuma Konsilantaro de Campinas, S-ro Fernando Marinho, prezidanto de Brazilia Esperanto-Ligo, D-ro Álvaro Fausto de Souza, prezidanto de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, S-ro Carlos Cunha, prezidanto de Brazilia Konsilantaro de Esperanto, S-ro Ivon Barbosa, ĉefdelegito de U.E.A.,

Prof. Ivanhoé Rodrigues Baraço, de Universitato de Campinas, reprezentanto de la loka esperantistaro.

Prof. Osiro Silveira stariĝis kaj solene malfermis la Kongreson. Aŭdiĝis koncerto ludita de la muzikistaro de la 8-a Bataliono de la Militista Polico sub la direktado de Leutenanto João Chagas, la voĉo de la sopranulino Assunção de Luca kaj la Ĥoro Carlos Gomes de Spiritisma Federacio de Ŝtato São Paulo, sub la gvidado de S-ino Henriqueta Moreira, kun pianakompano de S-ino Orquídea Lino.

Post la saluto al la kongresanoj farita de la podianoj, S-ro Benedicto Silva faris la festparoladon de la Kongreso.

En la dua parto de la kunsido denove prezentigis la cititaj artistoj kaj fine paroladis D-ro Ozayr Rizzo, kaj D-ro Osiro Silveira informis pri sia leĝoprojekto enkondukanta Esperanton en la lernejojn de 1-a kaj 2-a gradoj.

Dua tago

La laboroj dum la Kongreso okazis en la Urba Palaco kaj en la Lernejo Carlos Gomes,

Parolado de la Prezidanto de B.E.L.



Estimataj gesamideanoj,

Ŝajnas al mi, ke ni ĉiuj, kiuj interesiĝis partopreni en ĉi tiu Kongreso, estas sufiĉe bone preparitaj por serena aŭskultado de la diversaj vidpunktoj koncernantaj al la temo "Integrigo en la Brazilia Esperanto-Movado".

Guste pro tio, ke ni konsideras nin sufiĉe maturaj por diskuti la temon, mi kura-

kies ĉambroj ricevis la nomojn de forpasintaj esperantistoj.

La 13-an de Julio, en la Urba Palaco, okazis la unua prezentado de la tezoj pri la temo de la Kongreso: "Integrigo en la Brazilia Esperanto-Movado".

Tie ankaŭ okazis du prelegoj; la unua pri "Duonaŭtomata tradukado pere de Esperanto" (D-ro Victor Sadler) kaj la dua pri "De familia al Tutmonda Kulturintegrigo per Esperanto" (S-ro G. René Ledon). Samloke vespere okazis lanĉo de la novaj eldonadoj en kaj pri Esperanto kaj artvespero gvidita de S-ro Amarílio Carvalho.

En la Lernejo Carlos Gomes okazis: kurso de Esperanto por komencanto farita de D-ro Sylla Chaves kaj konversacia rondo gvidita de D-ro V. Sadler; prelego pri la temo "Kiel eviti dentan karion" (D-ro Roberto Resende); kunvenoj de artistoj esperantistoj (S-ino Symilde Ledon), de vegetaranoj (S-ino Cediha Neto); pri lingvaj demandoj (Akademia- no Geraldo Mattos); honorigo al Braz Con- senza, mortinta en Marto pasinta (F-ino Elma do Nascimento); "Ŝtatparado", mallongaj

ĝas atentigi vin pri kelkaj punktoj, malfacile tuŝeblaj pro tiklaj kialoj.

Mi esperas, ke dum mia parolado vi bonvole forgesu ĉian antaŭjuĝon, kiun vi eble havas pri la Ligo aŭ ĝiaj estraranoj.

El la Statuto de B.E.L., asocio fondita antaŭ preskaŭ 77 jaroj, mi substrekas:

Art. 1-a — *Brazilia Esperanto-Ligo* (B.E.L.), nomo, kiun ekde ĉi tiu dato havos "Brazilia Ligo Esperantista", fondita la 21-an de Julio 1907, kun sidejo en Rio de Janeiro, celas:

a) . . .

b) kunigi la Esperanto-instituciojn en Brazilo, kaj kunlabori kun ili,

Art. 3-a — Povas esti membro de la Ligo ĉiu bonkondata persono, interesiĝanta pri la lernado kaj dissemado de Esperanto.

. . .

§ 7-a — Aliĝinta institucio estas tiu, kiu, post akcepto de ĉi tiu Statuto kaj kun sia propra aprobita de la Ligo, ali-

raportoj pri la agado por Esperanto en la Ŝtatoj: prezentitaj de la koncernaj reprezentatoj.

Tria Tago

En la 14-a de Julio, je la 8,30 estis starigita Monumento al Zamenhof sur la Placo Napoleão Laureano. Ĝi konsistas el betona bloko sur kiu estas medaliono kun la portreto de la Iniciatinto de Esperanto. La Monumenton kreis Prof. Luiz Telles, aŭtoro de la kongresa afiŝo.

En la sama tago, okazis Ĝenerala Kunsido de Brazila Esperantista Junulara Organizo, kunvenoj de Oomotanoj, de Nacia Esperanto-Komisiono, de Filozofia Asocio Tutmonda, de Esperanto-Instruistoj, de Esperantistoj Katolikaj, de Spiritistaj Esperantistoj, de kompilantoj de Esperanto-vortaroj; D-ro Syl-la Chaves prelegis pri "Informadiko kaj la Tria Jarmilo" kaj D-ro Carlos Lima Melo pri "Homeopatio kaj Psikologio."

Lasta Tago

La 15-an de Julio, matene, Pastro Petro

gis al ĉi tiu ĉiujn siajn anojn.

Dum pli ol 40 jaroj la Ligo estis la nura landa asocio en Brazilo. Do, almenaŭ en tiu tempo, oni ne havis argumentojn por plendi pri malkuniĝo, ĉar estis nur unu integriĝa asocio.

Simile al la nuna tempo, ankaŭ tiam nek la Ligo, nek iu ajn esperantista asocio, plene kontentigis ĉiujn samideanojn. Novaj grupoj estis bonintence organizitaj, kun la celo vigligi kaj plirapidigi nian enlandan movadon. Tiuj grupoj kreskis, arigis multajn simpatiantojn, okazigis eventojn, akiris proprajn sidejojn, pligrandigis la nombron da esperantistoj en Brazilo, sed ne sukcesis kontentige solvi la integran problemon. Kontraŭe, oni disdividis la fortojn. Hodiaŭ ni kongresas ĝuste por analizi nian integriĝan staton, kolekti ideojn kaj decidi pri la plej konvenaj farendaj paŝoj al la solvo de tiu ĉi afero.

Verdire, ni diskutas pri "reintegriĝo", tio estas, restariĝo de la integreco de la es-

Urbaitis faris meson en la Katedralo de Campinas.

Post la Malferma Kunsido en la Salono Zamenhof, kiam estis akceptita la invito por okazigo de la 21-a Kongreso en Belo Horizonte, la kongresanoj ekskursis tra la urbo.

Ankoraŭ pri la Kongreso

Kunveno de Vegetaranoj

La kunveno okazis la 13-an de Julio en la Ĉambro Nelson Silveira, sub la prezidado de S-rino Cedilha Neto, kun la ĉeesto de 26 vegetaranoj.

S-rino Cedilha faris koncizan raporton pri sia vegetarana vivo kaj menciis la ekziston de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, fondita en 1908, kies unua prezidanto estis L. Tolstoj.

Kunveno de artistoj-esperantistoj

Pro grava malsano de sia edzo, S-ino Maria Almada ne partoprenis la Kongreson. Ŝi estis anstataŭita de S-rino Symilde Schenk Ledon, kiu prezidis en la kunveno, okazinta en 13.7.84, en la Ĉambro Laszlo Zinner. Ĉeestis 6 artistoj.

peranrista socio, ĉar en la komenco ne estis malintegriĝo, kaj la movado estiĝis sub la influo de tutlanda koncepto.

Lastatempe oni multe parolas pri la neceso havi unu solan landan organizaĵon en Brazilo. Kelkaj proponas la kunfandiĝon de la tri ekzistantaj asocioj, nome B.E.L., K.K.E. kaj B.K.E., anstataŭ rekonstrui la historian rolon de la plej malnova institucio, ĉar ili opinias, ke oni devas samnivele subteni la tri, por eviti eventualan malkontentecon.

Kompreneble la vorto "kunfandiĝo" sonas tre agrable, sed la responda ago portas plurajn nepre evitendajn problemojn.

Laŭ semantika vidpunkto, la vorto *integriĝo* devenas de *integra*, tio estas: *kompleta*; *el kiu oni forprenis nenion*.

Nia movado, en Brazilo kaj en la mondo, bedaŭrinde ankoraŭ restas nekompleta, nesufiĉe forta en multaj rilatoj, ekzemple:

- informado nesufiĉa, pro manko de rimedoj;
- teknika literaturo tre malgranda,

Universala Artista Ligo de Esperantistoj (U.A.L.E.) estis fondita en 1978 dum la 63-a Universala Kongreso de Esperanto. En la sekvinta Kongreso, en Antverpeno, Belgujo, U.E.A. akceptis la Ligon kiel fakan organizaĵon kaj en Budapeŝto, Hungarujo, U.A.L.E. okazigis sian unuan internacian artekspozicion, en kiu partoprenis reprezentantoj de Hungarujo, Jugoslavio, Pollando, Bulgarujo, Ĉinujo kaj Brazilo. Antaŭe en 1981, dum la 66-a Universala Kongreso en Brasília, S-ino Almada okazigis artekspozicion kun sukceso.

La sidejo de U.A.L.E. estas en Finnlando kaj ĝia Brazila sekcio, en Santos (Rua Timbiras, 8).

Kunveno de Esperantistoj Katolikaj

La 14-an de Julio, en la Ĉambro Braz Co-senza, kunvenis 32 katolikaj esperantistoj, sub la prezidado de S-ro Euclides Carneiro da Silva. La ĉefa celo de la kunveno estis la fondo de Brazila Esperantista Katolika Organizo, kies unua estraro estas: Prezidanto — S-ro Euclides Carneiro da Silva; Vicprezidanto — Yolanda Evangelista Silveira; Sekretario — S-ro Eluízio Bueno Rodrigues; Kasisto — S-ino Angela B. Del Antonio Rodrigues; Ĉefredaktoro de *Brazila Katoliko* kaj Religia Konsilanto — Pastro Petro Urbaitis.

Kunveno de Esperanto-Instruistoj

En la kunveno prezidis F-ino Elvira Fontes, kiu klarigis, ke la ĉefa celo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

kompare kun tiu de naciaj lingvoj;

- manko de kapablaj kursgvidantoj;
- manko de kontaktoj kun publikaj instancoj; k.t.p.

La celo de B.E.L. estas ĝuste tio, ke okazu integriĝo de la agado de la brazilaj esperantistoj, por atingi de pli bonaj rezultoj sur la cititaj kampoj kaj sur aliaj.

Ĉar hodiaŭekzistas du pliaj asocioj kun celoj similaj al tiuj de B.E.L., estas necese, ke ilia laboro estu kunordigita por ne malŝpari fortojn. La starigo de la Nacia Esperanto-Komisiono, okazinta en 1982, estis la unua paŝo tiucelen. La okazigo de ĉi tiu historia Kongreso ankaŭ estas eksterduba



S-ro Walter Francini

(I.L.E.I.) estas la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

D-ro Sylla Chaves prezentis siajn Esperanto-kursojn kaj Ing. Adonis Saliba sian metodon bazitan sur la strukturo de la lingvo.

D-ro Victor Sadler menciis kelkajn principojn kaj ideojn por la instruado de Esperanto, kiujn li ne nomas "metodon": estigi amikecon inter la lernantoj; provizi vortlistojn; prezenti ekzemplojn pere de bazaj strukturoj de frazoj; fari provokantajn demandojn al la lernantoj; konstrui historietojn aŭ fantaziojn, k.t.p.

Prof. José Passini raportis kiel li varbas

elmontri, ke la tri organizoj povas intense kunlabori favore al la disvolviĝo de nia movado.

Konklude, jen niaj proponoj:

— la tri asocioj, pere de la Nacia Esperanto-Komisiono, periode interkonsentu pri komuna laborplano;

— la tri asocioj plu faru komunajn kongresojn.

Esperante, ke ni povos agi per komunaj fortoj surbaze de tiu laborplano, kaj harmonie kaj amike kunlabori en la estonteco, ni frate salutas vin ĉiujn.

Dankon.

Fernando Marinho

Bezolucio de la 20-a Brazilia Kongreso de Esperanto

Oni prezentis kelkajn tezojn kaj opiniesprimojn, kiuj aŭ pledis por toleremo kaj amo aŭ estis variantoj de proponoj pri kunfandiĝo de la tri tutlandaj organizoj.

Pri la neceso de toleremo, amo kaj kunlaboro ĉiuj unuanime konsentas.

Pri la maniero, eblo aŭ eĉ neceso de la kunfandiĝo forestas la unuanimeco, ĉefe sed ne nur flanke de la respondeculoj pri la tri organizoj.

Tial konsiderante ke:

1-a) la tri organizoj jure ekzistas kaj fakte fruktodone laboris kaj laboras por Esperanto;

2-a) ili pli kaj pli kunlaboras kaj emas pluri tiun vojon;

3-a) ties respondeculoj jam konsistigas iuspecan superan konsilantaron por la komuna agado;

4-a) ni ne estas tiel riĉaj je sindonaj, malavaraj kaj kompetentaj batalantoj, ke ni povas facilanime perdi kelkajn;

5-a) la ĉefaj plendoj celas la disdividon de la fortoj kaj la ekziston de pluraj kotizoj,

Ni rekomendas, ke:

1-a) eventuale survoje al estonta iama kunfandiĝo, oni faru pluan paŝon per la enkonduko de unu sola kotizo;

2-a) cele al plia demokratigo, oni enkonduku en la tri organizojn la perleteran balotilon;

3-a) oni dividu la taskojn je ekzemple: informado, interna vivo, instruado;

4-a) oni daŭre havu la superan kunordigadon de N.E.K.;

5-a) oni plublikigu unu solan gazeton (monate).

instruistojn por la Esperanto-Movado.

La kunveno okazis en la Ĉambro Carlos Domingues, kun la ĉesto de 31 kongresanoj.

Brasila Esperantista Junulara Organizo

En la Salono Zamienhof, kunvenis la mem-

broj de B.E.J.O por diskuti pri jenaj temoj: manko de respondo de la anoj al la estraraj stimuloj; instigo al la reago de la lokaj junularaj grupoj en la Ŝtatoj, renkontiĝoj, seminarioj, k.t.p.

Estis kreita komisiono "Esperanto-Ludata" kun la celo proponi al B.E.J.O programon enhavantan plurajn aktivecojn bazitajn sur modernaj teknikoj de grupa interrilato por ke en amika, amuza, frateca atmosfero oni pli rapide sukcesu integri la movadanojn.

Aŭkcioj

La grandan sukceson de la du aŭkcioj oni sendube ŝuldas al la rolo de S-ro Gilbert R. Ledon kiel "aŭkciisto."

S-ro Ledon sukcesis kolekti la plej diversajn kaj variajn vendaĵojn, kiaj libroj (novaj kaj malnovaj), vinoj, ĉampanoj, parfumoj, ceramikaĵoj pli aŭ malpli artaj, pentraĵoj (de artistoj de U.A.L.E.), ĉemizoj, tablotukoj, filatelioj, entute 50 vendaĵojn.

Kaptante ĉiujn momentojn por amuzi la ĉeestantojn, S-ro Ledon sukcesis vendi ĉion.

Ĉar aŭkcio celas al financa helpo estus interese, ke en venontaj kongresoj oni havu ekskluzivan horon por ke ĉiuj povu partopreni en ĝi. Samtempa okazigo de aliaj programoj iom malhelpas.

Filozofia Asocio Tutmonda (F.A.T.)

En la kunveno de F.A.T. oni decidis daŭre okazigi simpoziojn pri Filozofio en la naciaj kongresoj por stimuli la uzadon de Esperanto en fakaj temoj kaj tiun mallongan simpozion en Campinas oni konsideris kiel la unuan paŝon por venonta granda nacia simpozio pri Filozofio.

Estis elektita Delegito de F.A.T. por Ŝtato São Paulo S-ro Euclides Carneiro da Silva.

Gvidis la kunvenon Prof. Evaldo Pauli, prezidanto de F.A.T.

Kongresanoj

- 344 Gislaine Neiva Fuques
- 345 Izabel de Oliveira Santos
- 346 Walter Jeronimo
- 347 Fondaĵo Soci-Kultur-Eduka
Volo de l'Suno
- 348 João Lucino de Souza
- 349 Jaddo Couto Maciel

350 Zilah Borner Hildebrand
 351 Vanderlei João Barbosa
 352 Ricardo Silva Braga
 353 Enrique Kohei
 354 Elva Kohei
 355 Ronaldo Ribeiro da Silva
 356 Nair Galvão
 357 Carlos Lima Melo
 358 Celso Teixeira Pinheiro
 359 Sylla Chaves
 360 Juliano Arruda Silveira
 361 Carlos José Almeida Lima
 362 Cynthia N. Rêgo Cunha
 363 Antonio Félix da Silva
 364 Esperanto-Klubo Montes Claros
 365 Amazona Esperanto-Asocio
 366 Elaine Guerra Donegate
 367 Alcyr Guedes de Almeida
 368 Denise Vernacci
 369 Marina Niceia Cunha
 370 Dino Zambenedetti
 371 Nedilton da Costa Ferreira
 372 Geraldo J. Samar de Andrade
 373 Luiz Antonio R. dos Reis
 374 Paulo Sergio Viana
 375 Geraldo Mattos
 376 Moysés Garcia Sobrinho
 377 Alvaro Henrique Dias Pinto
 378 Adriana Vello
 379 Iris Pereira da Silva
 380 André Koch Torres de Assic
 381 José Airton Salazar Parra
 382 Marirene Salles Mendes
 383 Jailson Lima de Medonça
 384 Suzy de Paula Corrêa
 385 Ana Claudia Salles Campbell
 386 Sonia Mary Ribeiro
 387 José Batista de Praus
 388 Alfredo dos Santos Guerreiro
 389 Marcus Tulio de Almeida Flores
 390 Ana Lucia Crespo
 391 Terezinha Crespo
 392 Maria Cristina Machado
 393 Said Pontes de Albuquerque
 394 Lenine Lucas Lopes da Silva
 395 Michel Georges Duré
 396 Júlio César Moreira da Silva
 397 Marcos Vinicius S. Pereira
 398 Carlos Augusto Guedes
 399 Waldemiro Lage Passos
 400 Mozar Alves de Andrade
 401 Juvenal Pequeno Neto
 402 Maria das Graças Salgado
 403 Alcride Maria de Fatima Gomes
 404 Rosa Maria Mendes
 405 Herminia Azevedo Magalhães
 406 Tamy Grace Simões
 407 Telma de Oliveira
 408 Rose Mary Conceição Gomes
 409 Neuza Pereira Campos
 410 Katia Otoni Nalon

Aperfeiçoe o seu conhecimento

Oferecemos um trecho de Rui Barbosa, de que daremos a tradução no próximo número. Convidamos os nossos leitores, que desejarem aperfeiçoar-se, a fazer desde logo a tradução para confronto com a que será publicada.

Frisamos que a tradução não é para ser remetida à B.E.L.

A Couve e o Carvalho

Rui Barbosa

Enquanto Deus nos dê um resto de alento, não há que *desesperar* da sorte do bem. A injustiça pode irritar-se, porque é precária. A verdade não se impacienta, porque é eterna.

Quando praticamos uma ação boa, não sabemos se é para hoje, ou para quando. O caso é que os seus frutos podem ser tardios, mas são certos. Uns plantam a semente da couve para o prato de amanhã, outros a semente do carvalho para o abrigo do futuro. Aqueles cavam para si mesmos. Estes lavram para o seu país, para a felicidade dos seus descendentes, para o benefício do gênero humano.



411 Nícia de Mattos Borges
 412 Paulo Bogchat Borges
 413 Eugenia Barcevicus
 414 Clarice Barcevicus
 415 Cristina Karsokas
 416 Elmano Barbosa
 417 Wlamir Jofre Freitas
 418 Isao Noguti
 419 Alberto Barrocas
 420 Heliana C. de Barrocas
 421 Luiz Alberto Martins
 422 Henriqueta G. D'Angelo
 423 Leila Magalhães
 424 Carlos Eduardo da Silveira
 425 Jaime Splettstoser Jr.
 426 Luiz Carlos D'Angelo
 427 Odacir de Mattos Filho
 428 Pedro de Lima Brenneisen
 429 Euripedes Araujo
 430 Valéria T. de M. Grilo
 431 Itacir Luchtemberg
 432 Mario Cesar Zombaldi
 433 Amélia M. Hamada
 434 Pe. Paulo Mercieca
 435 Longuinhas Queiroz
 436 Gilberto Martins B. Filho
 437 Laila Mattar
 438 Antonio Maximo dos Reis
 439 Regina Karsokas
 440 Gilberto Gaiagalas



Brazila Kroniko

Bahia

Salvador — La numero de Jul-Aŭg 1984 de "Bahia Espírita", oficiala organo de Spiritisma Federacio de Ŝtato Bahia, publikigas informojn pri Esperanto.

Paraná

Curitiba — La numero Aŭg-Sept 84 de "Paraná Informilo" sciigas nin pri la nova estraro de Paraná Esperanto-Asocio: Prezidanto — Espedita de Castro Feitosa; Vicprezidanto — Teresa Cristina Marin; 1-a Sekretario — Doriane Rossi; 2-a Sekretario — Ronie Cardoso Filho; 1-a Kasisto — Álvaro Maurício Delgado Diaz; 2-a Kasisto — Thomaz Milton Verástegui; Bibliotekisto — Nidia Teresinha Sampaio; Kontrola Konsilantaro: Salvador Raymundo, Gert Drucker, Hermanito Christensen, Nanna Carvalho Sandahl kaj Francisco José Soares Portugal.

"Paraná Informilo" estas organo de Paraná Esperanto-Asocio, Rua Dr. Maciel 542 s/ 1201-1202, Curitiba. Kunsidoj: la 2-an kaj 4-an sabatojn de ĉiu monato de la 17-a ĝis la 19-a

Rio Grande do Sul

Porto Alegre — Jen la nova Estraro de Gaúcha Esperanto-Asocio por la periodo 1984-1986: Honora Prezidanto — D-ro Modesto Belmonte de Abreu; Prezidanto — Ivo Sanguinetti; Vicprezidanto — George Otto Vaske; Sekretariino — Zélia C. da Silva; Kasisto — Solon F. Sant'Anna; Kulturaj kaj Publikaj Aferoj — César D. Soares; Konsilantoj — Armindo Trarbach, Manoel Torres Abreu kaj Celso Boris Eston.

"Brazila Esperantisto" deziras al la nova Estraro fruktodonan laboron.

Rio de Janeiro

Barra Mansa — La "Gazeta de Barra Mansa, de 02. Aŭg. 84, publikigis informon pri la 20-a Brazila Kongreso de Esperanto,

okazinta en Campinas. Redaktis la tekston S-ino Denise Arneiro Deslandes, anino de B.E.L. kaj sindona esperantistino multe laboranta por nia afero en Barra Mansa.

Rio de Janeiro — La "Supera Militlernejo" publikigis broŝureton kun informoj pri sia historio, celoj, organizo, agado k.a. en la lingvoj portugala, itala, hispana, germana, angla, franca kaj en Esperanto.

"Supera Militlernejo" estas centro de altaj studoj kaj esploroj por prepari civilulojn kaj militistojn por gvidfunkcioj kaj planado de la nacia sekureco.

— De 26.8.84 ĝis 01.09.84, en la kvartalo Bangu, okazis la 1-a Semajno de Spiritistoj-Esperantistoj. Prelegis Celso Martins, Delio Pereira de Souza, Haroldo Silva, Paulo Andrade dos Santos, Alfredo Aragón, Chersoneso de Galvão kaj Nelson Pereira de Souza.

La prelegojn organizis Unuiĝo de la Spiritistaj Societoj de Rio de Janeiro, Regiona Unuiĝo de la Spiritistoj de Santa Cruz kaj de Bangu kun la apogo de Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga.

— La n-ro 186, Aŭg 84, de la bulteno "O Sol Nascente" de "União Espírita Paulo, Dimas e Madalena" publikigas informojn pri Esperanto. Adreso de la redakcio: Rua Boiobi, 2.102, Rio de Janeiro, RJ.

— En la n-ro 134 de "Correio Fraternal", oficiala organo de "União Regional Espírita do Ramal de Santa Cruz" aperas informoj pri Esperanto.

Adreso de la redakcio: Rua Silva Cardoso, 673, 21810 Rio de Janeiro, RJ.

Roraima

Boa Vista — La numero de 31. Majo. 84 de la ĵurnalo "O Roraima" publikigas duonpaĝon de informoj pri Esperanto danke al la iniciato de S-ro Raimundo Dourado de Souza, prezidanto de Esperanto-Asocio de Roraima (Rua Ribeiro Campos, 69, 69300 Boa Vista, RR).

H A J K O J

Diderto Freto

*Naskiĝis homid'.
Kio okazos al li?
sufer'kaj perfid'!*

☆☆

*Estu sindonaj:
utilu en la vivo,
per verkoj bonaj!*

☆☆

*Kial vanto, hom',
se vi baldaŭ reĝos
denove atom'?*

☆☆

*Kial, fiulo,
mortas vin la envio?
Ho, vi, nur nulo!*

☆☆

*Jen Esperanti':
unuĝo de l'homoj
por monda soci'!*

D-RO VICTOR SADLER EN B.E.L.

D-ro Victor Sadler, antaŭa Ĝenerala Direktoro de U.E.A., nuntempe loĝanta en Brazilo, prelegis en la sidejo de B.E.L., la 30-an de Junio pasinta. "Ĉu U.E.A. estas universala?" estas la titolo de la prelego. D-ro Sadler mem responde diris, ke en la praktiko U.E.A. ankoraŭ ne estas universala, sed potenciele jes. Universaleco estas ne stato, sed celo. Survoje al tiu celo, U.E.A. komencis en la lastaj jaroj establi novajn oficejojn en diversaj partoj de la mondo. Sekve de tio, D-ro Sadler havas la komision esplori la eblecojn por starigi oficejon en Brazilo.

Dum la prelego, D-ro Sadler prezentis siajn ideojn kaj konkludojn pri la plej bona vojo por ke U.E.A. atingu plenan universalecon.



Esperanto en Brazilo

Brazila Esperantisto informis:

5 Oktobro 1913. Inaŭguro de strato Esperanto en kvartalo Realengo, Rio de Janeiro.

29 Oktobro 1913. Leĝo n-ro 1162 perme-santa la nedevidan instruadon de Esperanto en lernejoj de Ŝtato Rio de Janeiro.

31 Oktobro 1917. Laŭ dekreto n-ro 1165, la strato Maria José, en Rio de Janeiro, estas de tiam nomata Zamenhof.

31 Oktobro 1918. Leĝo n-ro 759 perme-santa la nedevidan instruadon de Esperanto en la Normala kaj duagradaj lernejoj en Ŝtato Sergipe.

El la Ora Libro

En 1937, aperis la Ora Libro eldonita de la Loka Kongresa Komitato de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto, okaze de la 50-a datreveno de Esperanto. La verko rememoras la mortintajn pionirojn kaj la veteranojn tiam vivantajn, kiuj adeptiĝis al Esperanto jam antaŭ la Unua Kongreso.

En la ĉapitro "Kiaj ili estis?" oni prezentis kelkajn anekdotojn pri Zamenhof kaj pri aliaj elstaraj esperantistoj. El tiu ĉapitro ni prenas la jenon.

Dum la Kongreso en Krakovo, en la teatro, Zamenhof sidas en sia loĝio. Eniras Leo Belmont, kiu volas saluti lin. Zamenhof, gastama kiel ĉiam, volas lin sidigi sur la unuan lokon.

— Ho, ne S-ro D-ro, mi tion ne faros.

— Kial? Bonvolu sidigi!

— Oni povus kredi, ke estas *mi* la aŭtoro de Esperanto. . . Mi ne volas kompromiti min!

Ridu, ni petas

Ekde la inaŭguro de la nova aŭtovojo, la lokaj bienistoj forte ĉagreniĝis pro la difektoj de la progreso. Anasoj kaj kokinoj breditaj en libereco mortis centope puŝvunditaj de la aŭtomobiloj kun fulma rapideco. Post multaj diskutoj unu el la bienistoj trovis la ĝustan

solvon por malaltigi la rapidecon de la pasantaj aŭtoj. Tabulo kun jena avizo: "Atentu, kampo de nudistoj".

☆☆☆

Sendube li estis optimisto. Kondamnita al 20 jaroj da prizono puno, en la unua tago li demandis sian ĉelan kunulon pri ties juĝdecido.

— Mi ricevis 30 jarojn.

— Do, se vi ne ĉagreniĝos, mi restos en la lito proksima al la pordo. Mi eliros la unua.

Bibliografio

Angla-Esperanta Telekomunika Vortaro, Christian Berlin. Bretagne en Direct-Breizh War-Eeun, 1983. 70 p. Ilustrita.

Pli ol 1500 vortoj kaj esprimoj uzataj en telekomunikado.

La Aventuroj de Hucklebury Finn, Mark Twain. Bulgara Esperanto-Asocio, 1982. 32 p. Ilustrita de Tibor Horváth.

Bildstria rakonto.

El Parnaso de Popoloj, A. Grabowski. Artur E. Iltis, 1983.

Represo de poemaro el diversaj lingvoj tradukita de A. Grabowski.

Hungara Antologio, Corvina Kiadó, 1983. 448 p.

Pli ol 200 literaturaj pecoj kun enkonduko de V. Benczik kaj rekomendo de William Auld.

Konstrui novan ponton, Wan Yun. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982. 37 p. Ilustrita de Chen Yongzhen.

Fablo pri kunlaboro inter sciuro, leporo, ĉimpanzo kaj elefanto.

La Lingva Esenco de Esperanto, Atanas D. Atanasov. U.E.A., 1983. 175 p.

Artikoloj pri esperantologiaj temoj.

Ukrainaj *popolaj fabeloj*. El la ukraina tradukis N. H. Andrianova. B.E.A., 1983, 77 p.

Dudek du fabeloj.

Lingva Rubriko (9)

De tempo al tempo ni legas en la Brazilaj Esperantaj periodaĵoj la vorton gubeniestro por traduki *governador*. Ĉar antaŭe ni ne legis la Esperantan vorton en tiu senco, ni supozas, ke tiu misuzo venas de senatenta konsulto en la vortaro Esperanta-Portugala.

Fakte en "Dicionário Esperanto-Português" de C. Fernandes e C. Domingues troviĝas sub *gubernio* *província*, *governo*; en "Grande Dicionário Esperanto-Português", de I. Gomes Braga:

Gubernio, *província*, *governo* (parte de país ou colônia); *-estro*, *governador* (de *província*).

Ni memoru, ke kiel Usono, same Brazilo estas federacio, kies federalaj unuoj nomiĝas *ŝtatoj* kaj ties *estroj* estas *ŝtatestroj*. Tiel, la estroj de Ŝtatoj Paraná, Ceará, Paraíba k.a. estas ŝtatestroj.

En la portugala lingvo ne estas apartaj vortoj por la traduko de *gubernio* kaj *guberniestro*; tial la kompilintoj de la portugala vortaroj uzis la vortojn *província* kaj *governo* por la unua, kaj *governador* por la dua.

La "Lingva Rubriko (2)", B.E., Sep-Dec 1975, atentigas, ke la Esperantaj vortoj *konferenco*, *konvencio*, *profesoro*, *seminario*, *guberniestro* k. a. ne havas tiel larĝan sencon kiel la similaj portugala vortoj.

GRAVA TELEINFORMADIKA PROJEKTO EN BRAZILIO

Rapida progreso de la informadika teknologio en Brazilo, kaj la kreskanta bezono diskonigi kaj interŝanĝi informojn instigis la Brazilan Ŝtatan Telekomunikan Entreprenon (EMBRATEL) lanĉi projekton por utiligo de personaj komputiloj interkomunikigantaj per la tutlanda telefona reto. Celoj de la projekto "Ciranda" (portugaldevena danco kies anoj runde iras kun interplektitaj manoj) estas kultura, socipolitika disvolvado, familiarigo kun Informadiko, kaj ĝenerala pliklerigo de la uzantoj.

Ĝi esence konsistas el centra kontrolsistemo, publika telefona reto kaj el fina elemento — plejofte komputilo, televida ekrano aŭ teletajpilo. Abonantoj povas kontakti kaj

utiligi informo-bankojn en Brazilo, Usono kaj Eŭropo — pere de INTERDATA —, interŝanĝi mesaĝojn, anoncojn, konversacii kaj partopreni prelegojn aŭ publikajn debatojn.

La sistemo disponigas programojn por profesia perfektigo, administrado, scienco kaj teknologio, edukado, dom-mastrumado kaj ĉiaspecaj ludoj; ĝi ankaŭ proponas servojn sekretariajn kaj de elektronika "poŝtkesto".

Nuntempe jam aktivas en la projekto "Ciranda" kelkmiloj da familioj, en ĉiuj ŝtatoj de Brazilo, kaj la nombro verŝajne rapide kreskos, dank'al la relativa malplikostigo de komputiloj en la lando.

Cetere, la projekto estas bonega rimedo por diskonigo de la Internacia Lingvo, kiel ĵus konstatis esperantistoj uzantaj la sistemon de EMBRATEL.

Floriano Pessoa

69-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Prof. Evaldo Pauli reprezentis Brazilan Esperanto-Ligon kaj estis la anstataŭanto de la "Komitatano A", D-ro Sylla Chaves, en la 69-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Vankuvero, Kanado, de la 21-a ĝis la 28-a de Julio 1984.

Prof. Pauli partoprenis la kunsidojn de la Komitato, al kiu oni informis pri la Rezolucio de la 20-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Campinas.

En la 2-a Tutmonda Simpozio de Filozofio, en kiu prezidis Prof. Pauli, prezentiĝis du temoj: "Kibernetiko kaj Filozofio" (Prof. Helmar Frank) kaj "Kio estas Filozofio kaj kio estas Scienco" (Prof. Pauli).

Laŭ la raporto de Prof. Pauli la 69-a Kongreso estis efike organizita kaj lokaj gazetaro kaj radio vaste informis pri la Kongreso. Prof. Pauli mem kaj S-ro Adonis Saliba estis intervjuitaj de la loka radio.

VOCABULÁRIO

Português-Esperanto
Esperanto-Português
Carlos Domingues

Planejado principalmente para os cursos da Liga Brasileira de Esperanto, o Autor reuniu num só volume duas obras.

Embora se trate de obra concisa, o esperantista experiente encontrará nela precioso auxiliar.

Carlos Domingues foi presidente da Liga Brasileira de Esperanto e membro da Academia de Esperanto.

Preço: Cr\$ 8.000

ADAGIÁRIO ESPERANTO- PORTUGUÊS ESPERANTA- PORTUGALA PROVERBARO

L.L. Zamenhof — A. Couto
Fernandes

Provérbios sinônimos em esperanto e português. O texto em esperanto foi extraído do *Proverbaro*.

Completa o volume a 3a. edição de *Amo per Proverboj* (Amor por Anexins), de Artur Azevedo.

Cr\$ 4.000,00